5-a Jaro. N-o 213 APERAS  SEMAJNE 1. Novembro 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

PRI PROLETA LITERATURO

Instig~~ite~~ per enketo en la literatura revuo Mondo gvidata de H. Barbüs, multaj revoluciemaj verkistoj esprimis sian opinion pri la temo, kiel kaj ĉu povas ekzisti proleta literaturo. Ne estas la unua fojo, ke tiu temo okupis la spiritojn, sen ke kontentiga solvo estus trovita. Trocki eĉ verkis tutan libron pri la problemo. La opinion de M. Gorki legis la K-doj en n-o 196 de "S-ulo". El ĉiuj eldiroj rezultas, ke oni tre diversmaniere povas aliri la problemon. Oni solvas ĝin laŭ tio, ĉu oni rezonas marksisme-materialisme aŭ filozofe-idealisme, ĉu oni akcentas la kolektivismon aŭ individuismon. Sed du ekstremajn opiniojn oni certe povas formuli, inter kiuj laŭ ĉies subjektiva prijuĝo varias plej multnombraj konsideroj pri la problemo. Unu, la plej vastan certe, oni jene povus prezenti: Proleta literaturo estas ĉiu verko, kiu okupas sin pri sorto kaj vivo de proletoj, ĉiu verko, kiu metas en la fokuson de l' konsideroj aŭ priskriboj proleton aŭ la Proletaron — ĉu suferantan, ĉu triumfantan — kiel heroon. Laŭ tiu vidpunkto ne nur Zola, Tolstoj, Gorki, Strindberg kaj aliaj samepokanoj de socialisma disvolviĝo estus proletaj literaturistoj, sed ankaŭ Dikens, Turgenev kaj Andersen, ĉar ili verkis pri malriĉuloj. La antitezon oni tiel povus formuli: Neniu proleta literaturo ekzistas, ĉar neniu vera subpremata kaj elsuĉata proleto kapablas esti kreanto de literaturo en siaj teruraj ekonomiaj kondiĉoj. — Oni tuj vidas, kiom da nuancoj povas dismetiĝi inter tiuj du tezoj.

Mi estas malproksima de tio, opinii min sufiĉe kompetenta, por trovi la sintezon, la solvon al la problemo. Sed estu permesate al mi, kritike esplori la du tezojn kaj iliajn variojn. Evidente la dua el la cititaj tezoj respondus proksimume al severe marksisma prikonsidero de la demando. Ni akceptu por nia rezonado almenaŭ unu firman bazon el la marksisma ideologio, la difinon pri proleto (kiun ni ja akceptas ankaŭ kiel "sennaciuloj"): Proleto estas homo, kies vivrimedoj estas la nura vendo de sia laborforto. Ni prezentu al ni kelkajn konkretajn ekzemplojn: Karbministo, dek horojn laboranta sub la tero por akiri siajn vivrimedojn; kontoristo, kiu dum dek horoj dancigas siajn fingrojn sur skribmaŝino por kopii iun malinteresan ciferaron; fabriklaboristo, kiu tutan tagon en malbona aero plenumas senvarian korpomovon; kalkulisto, kiu ĝis vespera mallumo siajn okulojn fiksas sur ciferseriojn. Ĉu tiuj ĉi proletoj post sia dekhora labortago ĉerpos el siaj eluzitaj korpoj kaj spiritoj la freŝecon necesan por verki literaturon? Ĉu la emo ennaskita, la kapablo, la talento ne delonge formortis en tiaj kondiĉoj? Sendube ni alvenas al la konkludo, ke neniu proleto, en la vera senco de la vorto, kapablas verki literaturon . . .

Sed ekzistas du faktoroj, kiujn ni, tiel konkludante, malatentus. Unu faktoro estas la homa volo aganta. Tute sendepende de la laborkondiĉa malbonŝanco ni vidas iujn homojn ekverkantajn sub la impreso de fortaj ideoj. Certe ili ne estas multaj; sed ili estas. Cetere tio ne kontraŭas la antaŭan tezon bazantan sur la materialisma koncepto. Ĝi nur montras, ke individua homa volo aganta kontraŭas subpremon per la materiaj fortoj. Se ni neus la kapablon de tia volo ĉe individuo, ni logike ankaŭ devus nei ĝin ĉe kolektivo — sekve ĉiu ribelado kontraŭ la subpremo flanke de proletaj amasoj estus malebla. Kiel do klarigi la kapablon de kelkaj proletoj superi la malbonegan materian situacion kaj literaturi? La fakto ne estas pli surpriza, ol tiu, vidi kreantaj, verkantaj malsanulojn, februlojn (Heine, Ŝopin, Bethovn). Proleto pro sia materia situacio estas komparebla kun malsanulo. Kiel tiuj malsanaj eminentuloj, li iafoje estas krekapabla, ĉar ia potencega forto pelas lin. Tiu forto estas la konscio. Homo nekonscia certe neniam sentos en si volon por verkado. Sed proleto, kiu konsciiĝis pri sia propra kaj la situacio de sia samsortularo, povas, se tiu konscio estas superforta, venkante la materian mizeron fariĝi kreanto. Sekve la kresko de klaskonscio inter Proletaro, formiĝo de ĉi lasta kiel klaso, devas esti konsiderataj kiel bazo por kreiĝo de proleta literaturo.

La alia faktoro estas, ke homoj, kiuj estinte vivis en vere proletaj kondiĉoj, sed nun ne plu estas proletoj en tiu senco, verkas laŭ la memoroj, kiujn ili havas pri la estintaj travivaĵoj. Multaj inter la nunaj t. n. proletaj verkistoj apartenas al tiu kategorio: Sinkler, London, Beĥer, H. Zur Mühlen ktp. Aŭ ili tiel intime kunvivas kun proletoj el fabrikoj kaj laborejoj, ke ili kunsentante kvazaŭ tradukas iliajn parolojn en la literaturan lingvon. Se ni konsideras ilian literaturon kiel "proletan literaturon", jen ni proksimiĝas nepre al la unua el la du cititaj tezoj, kiu tiom kontraŭas la severe-marksisman. Se ni

nin turnas al Gorki, unu el la tiuspecaj "proletaj verkistoj" — oni legu lian komence menciitan artikolon — ni ekkonas, ke li ne parolas pri proleta verkisto kiel ekzistanta faktoro, sed skizas lin al ni kiel idealon, kiel estontulon. Li ankaŭ akcentas en tiu artikolo "la voladon al libero de laboro kaj verkado" kiel ĉefan instigilon. Li akcentas la volon, li limigas ĝian determinitecon. — Efektive, oni vidas, ke la diferenco inter la du tezoj pri proleta literaturo kaj la variaj opinioj pri ĝi estas intime ligitaj kun la opinio pri determinismo kaj vollibereco.

Ni tiru konkludon el la malmulto dirita (pli disvolvi la temon malpermesas la spaco): Ni opinias, ke sampaŝe kun la venko de la proletoj super la nuna sociordo kreiĝos "proleta literaturo" (sed la vorto "proleto" ŝanĝos sian signifon kun la progresanta liberiĝo, kun la transformiĝo de l' sistemo). Ni opinias, ke hodiaŭ ekzistas nur ekĝermetoj de tia literaturo, ke estas erare nomi proleta[1] ĉiun kun la laboristaro simpatiantan literaturon. Ni opinias, ke nia SAT-literaturo ludos distingan kaj decidan rolon en la kreiĝo de estonta proleta literaturo, konsiderante, ke liberiĝo de l' Proletaro ne estos ebla sen komuna lingvo. N. B.

---

[1] Tial ni avertas ankaŭ tiujn trofervorajn K-dojn, kiuj rifuzas la t. n. "klasikan" literaturon kiel neindan esti legata de proletoj. Legi la antikvulojn (Homeron, Platonon) aŭ la pli modernajn "burĝojn" (Geŭte, Volter') ne signifas por proleto misuzi tempon kaj energion! Tion mi ne skribas kiel tradukinto de "Faŭsto" (ĉar el tiu traduko mi ne havas iun personan profiton), sed pro konvinko. Malkonsentante kun la K-doj, kiuj dum la debato de l' 8-a Kongreso "kondamnis" principe la "Faŭst"-eldonon ĉe SAT, mi opinias, ke nia hodiaŭa laborula generacio (kaj kredeble ankaŭ estontaj) bezonas tiujn verkojn kiel fontojn de scio kaj arto.

Jam la 3. eldono

Post elvendo de 25000 ekz. ĵus aperis la 3-a, korektita eldono de la ŝatata kursa lernolibro por laboristoj laŭ rekta, parola metodo

Petro

Prezo: 0,70 mk. g. — La aŭtunaj kursoj komenciĝis!

Mendu tuj la bezonatajn ekz. rekte ĉe

Administrejo de SAT, Colmstr. 1 Leipzig O 27

Sovetianoj ĉe CK SEU, Moskvo, aŭ nia agentejo en Kremenĉug.

KONFLIKTO EN JUGOSLAVIO

(Fino)

Alkuris la reĝo, ekregis konfuzo, la registaro ektimis, ke en la lando eksplodos revolucio kaj tuj estis ĉesigataj ĉiuj telefonaj kaj telegrafaj rilatoj inter Belgrado kaj la cetera mondo. La gvidantoj de l'opozicio Radiĉ kaj Pribiĉeviĉ tuj deklaris, ke la popolo konservu trankvilon, kaj la popolo obeis. Militistaro, ĝendarmaro, policistaro, ĉio estis preparita por kontraŭbatali per pafiloj la revolucion, kaj certe estus mortigitaj miloj kaj miloj, se io estus eksplodinta. Ĉe la manifestacioj en Zagreb ja estis mortigataj 3 junuloj, ĉar ili kune kun aliaj manifestis kontraŭ tia parlamento kaj kontraŭ la registaro. Plej interese estas, ke la polico deklaris la mortigitajn junulojn kiel komunistojn, ĉar ĉe unu el ili ĝi trovis rublojn de generalo Vrangel, do senvaloran paperon. La polico kompreneble ne tuj diris, ke tio estis Vrangel-aj rubloj. La ekscitiĝo estis grandega, ĉie la popolo estis treege furioza kontraŭ tiaj parlamentaj metodoj.

La registaro, sub kies regado la atenco okazis, ne volis eksiĝi, ĉar ĝi preferis resti en sia pozicio, kiu ebligadis al ĝi la ekspluatadon de l' popolo. Post iom da tempo ĝi tamen eksiĝis, ŝajnigante, ke ĝi volas cedi al opozicio kaj ebligi formadon de nova registaro. La gvidantoj de la opozicio deklaris, ke ili postulas disigon de l' parlamento kaj formadon de neŭtrala registaro, kiu efektivigus la liberajn balotojn.

Komisiata estis unu el la radikala partio por formi novan registaron. La gvidantoj de la opozicio plej energie rifuzis ĉiun interparolon kun li. Komisiata estis poste generalo Haĝiĉ por formi neŭtralan registaron, kiu konsistus el la homoj starantaj ekster politika vivo kaj kiuj ludas en la scienca aŭ ekonomia vivo gravan rolon. Tiu ĉi komisio montriĝis kiel ordinara komedio. La konsultado daŭris 12 tagojn kaj poste la generalo redonis la komision ne forminte la registaron. Kaj tiam revenis la antaŭa registaro en nova formo. La formadon de registaro efektivigis gvidanto de slovena klerikala partio, pastro Korošec, kiu en la antaŭa registaro okupis la postenon de ministro por internaj aferoj kaj sub kies regado okazis la atenco en la parlamento kaj mortigado de manifestantoj sur zagrebaj stratoj. Estas tamen interese, kial oni komisiis tiun ĉi pastron por formi la registaron. La tendenco estas tre evidenta. Oni volis montri al la mondo, ke en Jugoslavio regas libereco, ke eĉ la reprezentanto de slovena klerikala partio, kiu havas ĉ. 20 deputitojn el sume 313 povas esti ministro-prezidanto. La mondo scias, ke serboj estas ortodoksreligiaj kaj jen, ili cedas la ĉefajn ministriojn al katolika pastro. Do, kroatoj kaj serboj el la regionoj de iama aŭstro-hungara monarĥio tute ne havas kaŭzon por ribeli kontraŭ la reganta klaso serba.

La unua ago de la nova registaro estis kunvoki la parlamenton en la sama ejo, kie okazis la atenco kaj en la parlamento akceptigi la "nettunajn konvenciojn", do agi kontraŭ la energia postulo de la opozicio elpelita per revolveraj pafoj el la parlamento. Ankaŭ tie ĉi vidiĝas, kia estas "la frato en Kristo", la pastraĉo Korošec. Responde al tiu provoko de la nova registaro kunvenis la opozicio la 1. aŭg. en malnova kroata parlamentejo en Zagreb, kaj post pritraktado de la situacio ĝi formis siajn decidojn jene: 1. Neniu leĝo, speciale neniu financa leĝo, farita en la parlamento dum la foresto de la opozicio el la parlamento, validas por la regionoj, kiujn reprezentas la opozicio. 2. La opozicio konstatas, ke en la konscio de la popolo nuliĝis la akto de 1. decembro 1918 kaj la konstitucio, kaj laŭ tio la opozicio deklaras, ke ĝi entreprenos ĉiujn eblajn paŝojn por la ŝanĝo de l' ĝisnuna regadsistemo en la ŝtato je tia, kia plene garantios, ke la unuopaj partoj de la popolo ne estos subpremataj de iu ajn alia parto, kiel ĝis nun okazis. — Post tio la opozicio komencis agi inter la popolo konforme al siaj decidoj faritaj dum sekretaj kunvenoj.

Unuflanke do Jugoslavio havas la parlamenton, en kiu okazis mortigo, kaj aliflanke estas la opozicio, kiu ne rekonas la parlamenton kaj faras la decidojn deklarante la laboron de tiu parlamento en Belgrado nedeviga por la regionoj, kiujn ĝi reprezentas. En tiaj cirkonstancoj venis la morto de la gvidanto de l' kroata vilaĝana partio Stefano Radiĉ, kiu estis treege ŝatata pro sia granda kaj oferema laboro por la kroata popolo. Li estis vere edukisto por tiu popolo, kiu antaŭ ol li komencis aktive labori en la popolo mem, eĉ ne havis preskaŭ la konscion, kiom ĝi valoras por la ŝtato. Lia enterigo montris, kiom li estis ŝatata. Necesus priskribi lian laboron iom pli detale por montri ĝin.

La registaro sub prezido de pastro Korošec akceptigis tagon post la enterigo de Radiĉ la "nettunajn konvenciojn". Por la konvencioj voĉdonis sume 90 deputitoj el 313. Ekestas nun la demando, ĉu tiuj konvencioj validas. La opozicio deklaras ilin senvalidaj. La malriĉa laboristaro kaj kun ĝi la tuta popolo en Dalmacio manifestas kontraŭ la konvencioj. La pastraĉa polico kaj ĝendarmoj persekutas la popolon pro manifestacioj. La faŝistaj mastroj de kelkaj italaj fabrikoj en Dalmacio

maldungas la dalmaciajn laboristojn kaj alkondukas novajn el sia faŝista Italio. Italio protestas ĉe la registaro kontraŭ la manifestacioj. Koroŝec deklaras, ke li prenis la regadon de la ŝtato laŭ deziro de l' Vatikano.

Interese estas konstati, ke la serba ŝovinista registaro volis amputi la kroatojn kaj serbojn kaj proponis tiun solvon al la reĝo. Nur pro energia kontraŭstaro de la gvidantoj de l' opozicio tiu amputo estis malebligata. Per tiu amputo volis nome la serbaj ŝovinistoj liberiĝi de l' kroata opozicio por povi libere ekspluati la ceterajn regionojn. Aliflanke la registaro riproĉas la opozicion, ke ĝi estas kontraŭ la nuna ŝtato, ĉar ĝi postulas justecon kaj liberecon. Konduto inda je katolika inkvizitoro.

Plej interesa estas tamen la nuna stato de tiu konflikto. La registaro ĉiel volas prezenti la batalon kontraŭ si, kiel batalon kontraŭ la ŝtato. Estas konate ke en Jugoslavio ekzistas fama "Leĝo pri defendo de ŝtato". Ĝi estis direktata siatempe kontraŭ la komunistoj. Nun la registaro sendas tra kroataj regionoj siajn agentojn, kiuj nokte disĵetas en la vilaĝoj kaj urboj komunistajn flugfoliojn preparitajn de l' registaro, kaj poste venas la ĝendarmoj, faras esplorojn, malliberigas homojn ktp.

La registaro deklaras, ke ĝi scias, ke la komunistoj estas preparitaj kaj atendas nur taŭgan momenton por revolucio, ke el Sovetio estas senditaj jugoslavaj elmigrintoj por fari atencojn kontraŭ la politikistoj de la regantaj partioj kaj de l' opozicio ktp. El tio ĉi estas videble, ke la registaro prepariĝas por novaj krimoj, por novaj atencoj kontraŭ la opozicio, kaj la kulpon ĝi ĵetos sur la komunistojn aŭ pli bone sur la tutan popolon, kiu estas kontraŭ ĝi.

Kiel rilatas la laboristaro al tiu ĉi konflikto? En tiuj ĉi ĉefaj linioj estas prezentita la tuta stato en la lando. La laboristaro vidas klare, ke estas neebla iu laboro je socia kampo, ĉar ĉiu, kiu sin deklaras kiel sindikatano, estas konsiderata flanke de belgradaj ŝovinistoj kiel komunisto. Pro tio nun ĉiuj sociaj problemoj kiel ankaŭ la kulturaj estas starigitaj malantaŭen kaj ĉiu sin okupas nur pri tiu konflikto. Tiel longe, ĝis tiu konflikto ne pasos kaj la cirkonstancoj ne aliiĝos, estas neebla ĉiu laboro. La Laboristaro de la mondo sciu pri tio kaj subtenu morale tiun batalon. Ĝi estu konvinkita, ke ĝi per tio multe helpos en la venko de justeco kontraŭ la perforto de l' serba ŝovinismo.

...a...v...o

NE SENDU TRO LONGAJN ARTIKOLOJN! VERKU KONCIZE!

HODIAŬ EN BULGARIO

IV

Banditoj

Oni aŭdas multe pri banditoj. Tiel oni nomas politikajn malamikojn, forkurintajn en la montojn. Tra solecaj, rokaj kaj sovaĝaj montoj ni marŝis. Ĉie paca loĝantaro. Nenie ni renkontis banditojn, krom armitaj ĉifonuloj sur solecaj vojoj. Sur la vojo al Sofio la ĝendarmoj tre ŝatas rigardi vian foton; estas kvazaŭ ilia pasio. Ŝajnas, ke post tiom da frostaj vintroj en la montoj ne povas resti eĉ unu el tiuj malfeliĉaj banditoj por semo, sed en la fantazio ili devas vivi, por pravigi la tenadon de multnombra ĝendarmaro.

Tia estas la vivo en lando tre bela kaj riĉa laŭ naturo, loĝata de paca, laborema kaj idealema kamparanaro.

La gazetaro

La nuna registaro traktas la bulgaran konstitucion kiel literaturan verkon, taŭgan nur por muzeo; same ĝi traktas ĉiujn leĝojn.

Per la nuna makedona registaro en Bulgario komenciĝis epoko de perfortoj, "senpostsignaj malaperoj". Aperis "specialaj leĝoj", kiuj leĝigis senleĝecon super la laboristaro kaj intelektularo, kaj kiuj malligis la manojn al diversaj fihomoj. Ĉi tiuj prizorgas la gazetaron. Konfiskado kaj subpremo de laboristaj gazetoj, "malaperoj", malliberigo kaj enkarcerigo de redaktoroj kaj korespondantoj iĝis afero ordinara. Unu post la alia aperadis la redaktoroj antaŭ policestroj. Specialan persekuton suferis la kunlaborantoj kaj legantoj de "Mladeĵka Duma" (la junulara Penso).

La kuraĝa gvidanto Nikola Rajkov, en Ĉirpan, nun centro de tertrema katastrofo, estis beste batata sur kapon en la "ordigejo", turmentata, kaj rezulte li iĝis freneza. En Gabrovo unu el gvidantoj estis ree kaj ree turmentata, ĝis kiam li subskribis leteron, ke ne plu li ricevos "Mladeĵka Duma"; tiam oni ĵetis lin por ripozi en malliberejon. Legantoj de la gazeto en Gabrovo estis ankaŭ arestataj kaj ĵetataj post seruron. La aperon de la gazeto oni permesas nur, por poste kaptadi la legantaron. Ĉi tiuj persekutoj ekflamigis pli en la koro ribelemon, kiun la laboristaro kaŝas nun profunde en si; en silenta protesto ĝi plidensiĝas ĉirkaŭ siaj nelaŭleĝaj klasorganizantoj, atendante la momenton, kiam batalo kontraŭ barbaroj estos ebla, kaj kiam ili denove povos preni en la manon torĉon de sia liberiga junulara ideo.

En vilaĝo kaj urbo

En Vidin multaj kruelaj aferoj okazis, sed kelkaj indignigas eĉ la senton de la al ĉio alkutimigita civitano. Ne sufiĉis batado de la amasoj kaj bremsado[1] de la progreso jam dum 5 jaroj: la zorgantoj pri "la ordo" komencis amuziĝi per honoro de niaj filinoj kaj fratinoj. En aŭtuno 1927, sen iu kaŭzo, policisto arestis sur la strato civitaninon A. M. En la policejo li donis al ŝi kelkajn frapojn sur la kapon kaj ĵetis ŝin en karceron. Venis poste la ĉefa policisto Pirinskij kaj penis perforti ŝin. Pro barakto, krioj kaj vokoj, la afero finiĝis nur per batoj. Tiu estro transdonis ŝin tiam al policisto Ilia Dĵerov, kiu kondukis ŝin en malhelan solecan straton ekster la urbo, kaj tie li perfortis ŝin. Poste, batante ŝin, li pelis ŝin en iun budon ankaŭ ekster la urbo. Tiam venis alia policisto kaj stariĝis por fari gardon, dum la unua denove ĵetis sin por ataki la knabinon. Ŝiaj krioj altiris la atenton de preterpasanta junulo, kiu enmiksiĝis en la afero. Sub protekto de la nokto la du policistoj forkuris. Kun atesto kuracista la afero estas transdonita al la juĝejo. Da tiaspecaj agoj de "ordogardantoj" en Vidin oni kalkulas kelkajn. Unu policisto eniris iun domon kaj arestis tie gastantajn fraton kaj fratinon. Ambaŭ estis batataj dum la vojo al policejo kaj la fratino perfortata en polica ĉelo. Kontraŭ tiu zorganto de socia moralo estis ankaŭ sendata plendo al la prokuroro kun doktora atesto.

Junulo estis juĝata kaj senkulpigata, kiel erare arestita. Sed post la aresto li estis batata kaj ankaŭ en policejo uzata por malpuraj celoj. Alia junulo, poste senkulpigita, estis ankaŭ perfortata kaj batata ĝis preskaŭ morto en la policejo. Tio estas regulo tra la tuta lando. Antaŭ la tuta mondo la bulgara junularo protestas kontraŭ la polico de l' nuna registaro, kiu estas minaco ne nur por la vivo, sed ankaŭ por honoro de elturmentitaj civitanoj.

La blindigitaj laboristoj

En novembro 1927, 22-jara junulo Ĥristo Antonov venis al Koprivŝtica por tie labori kiel veturilfaristo. La loka veturilkonstruisto, vidante en la novalveninto konkuranton al siaj interesoj, decidis fortimigi Ĥ. Antonov. Sufiĉis iri al lokaj makedonanoj, diri al ili, ke Antonov fiparolis kontraŭ Makedonio kaj makedonaj organizoj en Bulgario, ke li estas komunisto, kaj aliajn similajn aferojn, por turni tiujn makedonanojn kontraŭ Antonov.

La alian nokton post la alveno, je la 8-a vespere, aro da ekscititaj homoj malsuprengrimpis arbon kaj atakis Antonov. La apude staranta policisto rapide foriris, por ne esti atestanto de

[1] Haltigado, retenado.

la atako. Apenaŭ saviĝis Antonov el la manoj de tiuj bestoj, kaj revenis al Rahmanlare, kovrita per bluaj makuloj kaj vundoj sur la dorso. Tra tuta Bulgario oni aŭdas similajn rakontojn kaj povas vidi palajn tuberkulozajn homojn, atendantaj sian morton, iam florantaj junuloj, membroj de la parlamento, sed al kiuj la batoj kaj turmentoj policaj kaj makedonanaj lasis nur la proksiman tombon. Por siaj celoj la gvidantoj de makedona militista movado varbas ekzekutistojn kontraŭ la bulgara popolo inter la falinta kaj blindigita makedona proletaro.

V a g u l o j.

(Pluo sekvos)



KULTO AL KADAVROJ

Pensoj okaze de l' 1-a de novembro

La morto de iu individuo estas la neniiĝo de ĝia animo kaj la disfalo de ĝia korpo en putraĵon. Post la ĉeso de l' vivo restas nur senkohera materio; kaj mi opinias, ke estas iom ofende por la memoro pri iu amata estaĵo, konsideri tiun materion, kiu aspektas kiel — mi ne kuraĝas skribi la vorton, kiu sin prezentis al mia spirito —, kiel restaĵon de la geamatuloj, kiujn oni devas pli ol pie respekti, adori.

Neniam mi vizitas la tombojn de tiuj, kiujn mi amis, ĉar tie nur estas tero; tie neniam ili estis. Preskaŭ kun ploroj mi memoras mian patrinon, kiu tiel multe amis min, ke ŝi, mi kredas, atingis la plej supron de amo. Tamen mi neniam vizitas ŝian tombon, kie ŝi ne estas. Ŝi estas kaj vivas en mia koro.

Kiam mi mortos, mi deziras, ke miaj gekonatuloj kaj parencoj ne malŝparu monon por aĉeti senutilajn ornamaĵojn, nek tempon por ĉeesti forigon de mia putranta korpo. Mi deziras esti bruligata, kaj ke mia cindro estu kiel eble plej rapide disigata.

Se mi ne eraras, niaj sovetiaj K-doj pilgrimas al la tombo de Lenin. Tio similas la kristanajn morojn kaj estas sentema. La kristanoj bezonas ion palpeblan por firmigi siajn kredojn, ili bezonas adori panon pretekstante, ke dio estas en ĝi.

Ĉu la idealo de Lenin ne sufiĉas al niaj sovetiaj K-doj? Ĉu lia vivo, lia penso ne estas profunde enradikigitaj en ilia koro, tiel ke ili ne bezonu firmigi sian idealon per sentemaj agoj, kiuj similas la religiajn-idolanajn morojn?

9618.

Mondlingva movado bazita nur sur naciaj organizaĵoj estas kvazaŭ unukrura, ne ekvilibreca kaj kondamnita je pereo

RAPORTOJ

prezentitaj al la 1-a SAT-Konferenco en Göteborg

5. Resuma parolado de K-do Stay

("Pliintensigo de Laborista Kulturo")

La unua subparagrafo de la tagordo rilatas al alilanda korespondado individua kaj grupa. Ĝi ampleksas a) ekspedon de salutleteroj al laboristaj organizoj alilandaj diversfoje ĉe specialaj okazoj, b) senperajn rilatojn inter naciaj kaj internaciaj organizoj laboristaj per esperanto por: 1. akiri kaj liveri informon, 2. plenumadi enketojn, 3. grandskala kolektiva korespondado inter filioj de la naciaj kaj internaciaj organizoj. — Por realigi tion, estos nepre necese atingi, ke ĉe ĉiu nacia organizo troviĝu almenaŭ unu esperantista sekretario. Ĉi tiu ricevos de la Nacia Ekzekutivo, dusemajne aŭ monate, raporton pri funkciado kaj okazintaĵoj. Tradukinte tiun informon esperanten, la sekretario transsendos ĝin al Internacia Inform-Oficejo, kiu devos entrepreni la pluan disvastigon de la raportoj. Estas pripensinde, ĉu aŭ ne la jam ekzistanta Centrejo de Esperanto-Servo ĉe SAT povos fariĝi tiu Internacia Inform-Oficejo. Kompreneble la nomoj kaj adresoj de ĉiuj esp. sekretarioj devos esti sciigataj al tiu Oficejo.

Plua speco de korespondado estas la kolektiva, faka, inter apartaj grupoj de profesiaj, edukaj kaj industriaj organizoj, inter lernejoj, kluboj kaj fabrikoj en diversaj landoj. Tia korespondado verŝajne pritraktus la vivkaj laborkondiĉojn de samprofesiuloj en iliaj apartaj landoj. Oni povus precizigi tian interŝanĝon per demandaroj formulitaj de la membroj de organizo aŭ grupo, poste esperantigotaj kaj ekspedotaj al simila kolektivo alilanda por respondo. Sufiĉos unue, se troviĝos inter la membraro K-do preta prizorgi la tradukadon. Tiu ankaŭ laŭtvoĉe legados la respondojn en nacia lingvo dum grupkunveno. Sed oni devas profiti tiajn okazojn por instigi la aliajn K-dojn mem lerni esperanton.

Ekz. mi estas ĉi tie kiel delegito de organizo, kiu volas profiti kiom eble mian ĉeeston ĉe tiu ĉi Konferenco kaj mian viziton eksterlanden. Ju pli da utila informo mi povos transdoni al ĝi, despli ĝi interesiĝos pri esperanto kaj pri la demando rilate al laborista kulturo. Nu, tiu ĉi Instruista Labor-Ligo nuntempe tre deziras ricevi fidindajn raportojn pri la jenaj aferoj: 1. Gepatraj asocioj aŭ konsilantaroj ĉe la lernejoj en div. landoj. 2. Knabskolta movado. 3. Laboristaj junular-movadoj. 4. Militarismo kaj klastendenca instruado en la lernejoj. La Ligo akceptis esperanton kiel sian oficialan lingvon por korespondado, kaj ĝi tre danke ricevus informon en tiu ĉi lingvo pri tiuj temoj, kaj certe respondus kaj reciprokus laŭpove.

Sed eĉ se ni atingas vastegan interŝanĝon de leteroj, la laboro ankoraŭ ne estos finita. Ni devas krome pripensi, kiel plej trafe utiligi la leterojn kaj raportojn. Diversaj rimedoj sin prezentas al ni: Laŭtvoĉa legado en kunvenoj. Multobligo kaj dissendo de tradukoj al kelkaj organizoj kun similaj celoj kaj interesoj, al la gazetaro, speciale la sindikata, laŭ la temoj. Publikigo de nomoj kaj adresoj de redakcioj, kiuj akceptas informon en esperanto.

Pri alilanda libertempa vizitado de infanoj kaj maturaĝuloj per laborista vojaĝ-asocio mi diru, ke tio estas tasko, kiun la laborista movado certe devus provi plenumi. Internacia korespondado per lingvo facile lernebla de inteligentaj laboristoj ja estas bona, sed personaj kontaktoj estus multe pli bonaj, speciale se la lingva barilo jam estus nuligita. Kompreneble granda malhelpo estas la multekosteco. Nur la plej bone pagataj laboristoj kun pagata libertempo povus partopreni. Sed eĉ por tiuj favoratoj, mi kredas, oni povus fari pli multe per organizado. Laboristaj vojaĝ-asocioj jam ekzistas en kelkaj landoj. Ĉu reciprokaj aranĝoj por la laboristoj ĉiulandaj plifaciligus la veturadon alilanden?

En Francio ekzistas laboristaj libertempaj kolonioj de kooperativoj, kie franciaj laboristoj povas malkare pasigi sep aŭ dekkvar tagojn kun siaj familioj, en grandaj domoj, kiuj estas la posedaĵo de la kooperativoj. Ĉu similaj gastdomoj ne ekzistas en aliaj landoj? Ĉu estas iel eble atingi, ke la faciligoj disponeblaj al laboristoj en unu lando, estu haveblaj ankaŭ por laboristoj de alia lando? La sindikatoj kaj kooperativaj asocioj faru reciprokajn konsentojn aŭ kontraktojn por la bono de siaj membroj. Kaj ĉu SAT entreprenu la starigon de nova akcia turisma societo? (Ŝparkaso?)

Kio koncernas somerlernejojn kaj tendarojn por laborist-edukado, oni tie sukcesus malpliigi la koston de nutraĵo kaj loĝado. Denove la veturkosto malhelpus la organizadon. Aliflanke, la internaciaj tendaroj alportus multe da bono, kaj esperanto forigus la lingvan barilon. Ĉe tiaj renkontiĝoj en tendaroj oni povus organizi sporton, vagadojn, koncertojn kaj lekciojn, kaj la vizitantoj profitus per subĉiela vivado sunon, aeron kaj banadon.

N. LENIN:
Ŝtato kaj Revolucio
150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.
Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

Letero el Londono

"Aĉetu nur britajn varojn!" estas la ĉefa devizo de la Konservativa Partio. (Ni ne esploras, kio okazus en Britio, se ĉiu alia lando aĉetus nur siajn proprajn varojn!) Multe la registaro elspezas reklamante sian "solvon" de senlaboreco, kiu lasta ankoraŭ kreskas. Sed la registaro mem ĵus mendis de franca firmo draton por kabloj je kosto de £ 100 000. La kialo estas, ke trustoj volis pagigi al la poŝto, uzanto de la drato, tro da mono pro sia monopolo. Pruviĝas denove, ke post la tarifmuro trusto havas bonan ŝancon por ekspluati.

* * *

Laŭ la lasta havebla statistiko, kiu rilatas al 1926/27, la ĉiujara imposto po persono estas £ 18—12—6. El tio estas elspezata pli ol la duono, nome £ 10—19—1 por pagi la koston de militoj estintaj, estantaj kaj estontaj. Kompare kun £ 1—5—6 por la militŝiparo, edukado ricevas nur £ 1—2—11½; la armeo ricevas 19 ŝil. 3 p., sed vidvinoj kaj maljunuloj ricevas nur 15 ŝil. 2 p. Certe la milito donas profiton al la militŝuldantoj, ĉar el la supra enspezo de la registaro kompare kun 10 ŝil. 8½ p. en 1913/14, la procento sur la "Nacia Ŝuldo" faras po persono £ 8—7—5. Spite paroloj pri paco, la elspezo por la nunaj batalservoj (soldatoj, militŝipanoj ktp.) estas je duono pli granda ol antaŭ "la milito por fini la militon".

* * *

Dum multaj jaroj la telegrafkompanio grasiĝis per altaj dividendoj. La registaro subvenciis ĝin per 5 milionoj da funtoj, por provizi per kabloj la koloniojn. Rezerva kapitalo amasiĝis ĝis 7 milionoj da funtoj. Kompreneble la kompanioj ĝuis monopolan prezon, kaj la kosto de kablotelegramo restis alta. Pro tio en 1925 la ŝtata poŝtservo (angle: G.P.O.) aĉetis novan inventon, la radio-senfadenan telegrafilon, kies apliko malaltigis la prezon por telegramo. La kabloj ne povis konkurenci kun la ŝtate posedata meĥanismo. Komenciĝis agitado. Stariĝis oficiala enketo. La estroj de la telegraf-kompanioj (kompreneble patriotoj de kapsupro ĝis piedungo) minace anoncis, ke ili povas vendi siajn kablojn eble al Usono aŭ alia nacio. En la parlamento estas multaj akciposedantoj kaj direktantoj en la telegraf-kompanioj, kaj fine la konservativa registaro en aŭgusto decidis "luigi" la ŝtat-radioservon al la telegraf-kompanio. Forte protestis la parlamentanoj de la Labor-Partio, sed la konservativuloj, kiuj akiris sian povon per la falsigita "Zinoviev-Letero", lojale prizorgas la intereson de la riĉuloj. Spekulado okazis en la prezoj de la telegrafaj akcioj, kiuj nun unuiĝas; ekz. la akcio de la Hispana kaj Ĝenerala Korporacio saltas de preskaŭ nulo ĝis £ 1—18—6. La Labor-Partio jam anoncis, ke ĝi renversos la decidon, se ĝi akiros la potencon en venonta ĝenerala baloto. Eĉ pli grava ol la ŝtelo laŭleĝa de la ŝtata radio estas la rajto de la kompanioj cenzuri informojn per ilia kontrolo rilate al la komunikiloj. Monopolo en kapitalo, monopolo en kreo de opinio.

* * *

La direktoro de Publika Sano, d-ro Bentley, en Bengalio (provinco en Hindio) raportis, ke tie el proksimume 46 milionoj, 1½ milionoj da personoj mortas ĉiujare — kvarono el tiu sumo mortas pro evitebla malsano, malario, ĥolero, tuberkulozo. Li ankaŭ diris, ke plejparte la popolo nutras sin per manĝaĵoj, kiuj ne sufiĉas, por daŭrigi la ekziston de rato eĉ dum 5 semajnoj. "Hindio, la plej brila juvelo en la imperiestra krono!" 488.

Eksterordinara tago el mia vivo

La jaro 1905. Ondegoj de l' unua rusa revolucio ruliĝas tra la tuta lando ribeligante la popolon senrajtigitan, prematan dum jarcentoj. Mi estas militservisto. Mia bona amiko, ankaŭ militservisto el apuda regimento, proponas al mi iun tagon viziti mosovka'on[1]. Post momenta ŝanceliĝo mi konsentas. Vespero. Ni marŝas ekster la urbon. Tie nin renkontas du studentoj, kiuj amike salutas nin. Ili demetas siajn kitelojn uniformajn kaj transdonas al ni. Ni metas ilin super niaj blankaj ĉemizoj kun epoletoj, forŝovas la ĉapelojn kaj post tiu maskado jam kvarope daŭrigas la vojon. Mi rimarkas, ke la saman vojon rapidas iuj personoj, ĉu unuope, ĉu duope, silentemaj kaj enigmaj. Jen estas arbaro. Ni enŝoviĝas meze inter la arbojn. Oni povas iri nur unu post la alia, ĉar la vojeto fariĝis mallarĝa. Ĝi volviĝas meze de arbetaĵoj kondukante nin ien malsupren. Min ĉirkaŭprenas la freŝa kaj malseketa aero. Ni iras silente ĉiam antaŭen kaj pli kaj pli malsupren, kvazaŭ en iun senfundaĵon. Al mi ŝajnas, ke la vojo tute ne havas finon, sed jen ekaŭdiĝas en fronto: "Haltu, estas ĉi tie!" Mi ĉirkaŭrigardas. La malluma nokto estiĝis ankoraŭ pli malluma. Silento. Sed ni estas ĉi tie tute ne solaj. Mi tion klare vidas dank' al ekflamiĝantaj fajretoj de cigaredoj. Ili estas ĉie supre kaj malsupre de deklivo, apude kaj iom pli malproksime. La nervoj streĉiĝas. Mi atendas. Kaj jen ekaŭdiĝis forta ŝtala voĉo: "Kamaradoj..." Mi aŭdis neniam tiun vorton "libere" esprimatan. Kaj ekfluis flama parolado plena da revoluciaj devizoj kaj alvokoj al batalo pro libereco, pro rajtoj rabitaj, pro nia homa indeco... Mi vidas nek la oratoron, nek la ĉirkaŭantojn, sed mi profunde sentas, ke mia koro batas en unu ritmo kun ĉiuj ĉeestantoj...

La oratoro finis. Responde oni ekkantis revoluciajn kantojn. Mi estas emociita. Mi ankaŭ volas iel montri mian simpation al tiuj homoj. Mi metas for la studentan kitelon kaj restas en soldata uniformo. La samon faras mia amiko. Niaj blankaj ĉemizoj kontrastas sur malluma fono. Ĉirkaŭe aŭdiĝas flustraj voĉoj: "Soldatoj", "soldatoj", unuj singardemaj, aliaj ĝojplenaj...

La jaroj fluas. Mi spertis feliĉajn kaj flamajn bataltagojn pro tiuj devizoj kaj alvokoj proklamitaj dum tiu nokto. Mi spertis malliberejon, ekzilon kaj denove soldatiĝon, mondmiliton... Sed tiu tago estis la plej memorinda el mia tuta vivo, la plej eksterordinara. 3980.

[1] Amasa kunveno de revoluciuloj, malpermesita de l' registaro. Tiu vorto nuntempe ne plu estas uzata.

Diversaĵoj

Malvera informado

La franca burĝa gazeto "La Ĵurnalo" (Le Journal) aperigis artikolon de iu P. Benoit pri Aŭstralia prospereco. Estas mirinde. Sed li, laŭŝajne, ne vidis la senlaborulajn manifestaciojn nek la policanojn dispelantajn la homojn el strato. Jes, povus esti sufiĉe da laboro en Aŭstralio; sed ĉiu vaporŝipo venigas amasojn migrantajn el Sudeŭropo kaj Britio, ĝis antaŭe enmigrintoj kaj aŭstralianoj elpuŝiĝas el laboro por fari lokon por novaj alvenintoj... kaj ankoraŭ pliaj alvenas. Nuntempe mi estas senlaborulo. Pluvas, pluvadas, kaj ekhaltis la konstrulaboroj.

E. M. Wallace, Perth, Aŭstralio.

Pri Pentekosto

Tre ofte mi legas en "S-ulo" kaj aliaj gazetoj la esprimon "pentekosto". Kiam estas pentekosto? Ĉar mi ne scias, mi enrigardas mian anglan vortaron kaj trovas: Pentekosto — Festo de la judoj 50 tagojn post "passover". Tiam mi serĉas la vorton "passover". Mi trovas, ke tio signifas "festo de pasko". Sed kial uzi religian daton? Se ĉiuj religianoj diversaj tion farus, kia konfuzo okazus? Krome pentekosto estas tre nedifinita, kaj kalendara dato estas multe pli komprenebla al ekstereŭropanoj. Pri "granda fasto" mi pli bone estas informita, ĉar oni demandas butikiston, kial ovoj kaj fiŝoj tiel multe kostas, kaj li respondas: Tial ke estas "granda fasto".

E. M. Wallace, Perth, Aŭstralio.

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

Sub la kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: Dim. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio)

Pri studenta vivo en Aŭstrio

(Fino. Vidu n-o 208, pĝ. 423)

La vivkostoj estas kontraŭe sufiĉe altaj, kvankam ne tiom, kiom en Germanio. Mi aldonos modelan buĝeton (sur tre modera bazo). La monata vivbezonaĵo sumiĝas jene:

	ŝil.
Por ĉambro ĉ.	45
Por tagmanĝoj en la t. n. "Mensa Academica"	36
Por maten- kaj vespermanĝoj ĉ.	60
Banejo kaj tualetaĵoj	10
Lavado de tolaĵo	10
Vest- kaj ŝuriparoj, neantaŭviditaj elspezoj	20
Sume:	180

Ne kalkulante la kostojn de eventuale necesaj lernakcesoraĵoj, elspezoj por kultur-aferoj, teatroj k. s. Ni devas taksi do la necesan vivminimumon je proks. 200 aŭstr. ŝil. aŭ preskaŭ 30 usonaj dol. monate. Flankaj enspezeblecoj preskaŭ ne ekzistas pro la severa senlaboreco.

Mi nun volas iomete priskribi la studaranĝojn. Mi faros ĝin iom pli detale por la medicina studfako, al kiu mi mem apartenas. La studdaŭro ampleksis ĝis nun 10 semestrojn (duonjarojn) aŭ 5 studjarojn (unu studjaro dividiĝas en 2 semestroj). Depost ĉi tiu jaro ĝi daŭros 6 jarojn.

La unuaj du jaroj estas dediĉataj al la studado de la teoriaj preparfakoj: zoologio, fiziko, ĥemio, anatomio, histologio kaj fiziologio. La reston de la studdaŭro okupas la t. n. "klinikaj fakoj". Ĉe la Viena universitato ne ekzistas iaj enirekzamenoj: oni akceptas laŭ la finatestoj de mezlernejoj, laŭ la t. n. "atestoj de matureco". Ĝis sia doktoriĝo la studanto de medicino devas fari sume 18 ekzamenojn, dume disertacio nun ne plu estas postulata. La ekzamenoj estas dividataj en tri t. n. "rigorozoj" aŭ ekzamengrupoj, po 6 ekzamenoj. La unua rigorozo ampleksas la unuajn 6 fakojn, kiujn mi nomis antaŭe; ĝi devas esti plenumita ĝis la fino de la kvina semestro. Oni ekzamenas sufiĉe severe, kaj tre granda parto de la studentoj perdas unu aŭ du semestrojn pro malsukceso en tiu aŭ alia fako. Ĝenerale estas permesata ĝis trifoja ripetado de unu fako; studento, malsukcesinta la trian fojon ĉe la sama profesoro, perdas la rajton pri plua studado.

La studkostoj faras por enlandanoj ĉ. 60 ŝil. po semestro, aŭ 120 ŝil. jare (t. e. 9 resp. 18 dolaroj), por eksterlandon la trioblon. Sukcese studantaj povas ĝui favoron: enlandanoj povas esti tute aŭ parte liberigataj de la pago, la eksterlandanoj tute aŭ duone egaligataj al la enlandanoj.

La antaŭ-tagmezo de la studanto pasas per aŭskultado de la lekcioj, la posttagmezo estas ĉefe dediĉata al la praktikaj laboroj, ĉu en la ĥemia aŭ anatomia instituto, ĉu en la diversaj klinikoj kaj malsanulejoj. Pro la vasta amplekso de la moderna medicino la ŝarĝo de la studentoj per lernmaterialo estas ega kaj la diversaj okupoj kaj laboroj daŭras ofte ĝis malfrua vespero.

Nuntempe nur malmultaj studentoj sukcesas fini ĉiujn studojn dum la difinita tempo, kaj granda parto da ili perdas unu aŭ eĉ du jarojn. La studo ĉe la aliaj fakultatoj daŭras malpli longe: la juristoj bezonas kvar jarojn, la t. n. "filozofoj" — sub tiu nomo oni unuigas ĉi tie ĉiujn studentojn de la natursciencoj, de ĥemio, filologio, historio k. s. — studas ĉ. kvar kaj duonon da jaroj. Pri la teologia fakultato, kiu ankaŭ ekzistas ĉe la Viena universitato, mi ĉi tie ne raportos, ĉar ĝi certe neniun el la legantoj interesos! La finstudintoj en la aliaj fakultatoj krom la medicina devas prezenti disertacion aŭ t. n. diploman laboron por ricevi la titolon de "doktoro". La nombro de la ĉiuspecaj intelektuloj en Aŭstrio estas tre granda kaj la bezono je novaj estas preskaŭ nula. Grandan elcenton de ĉiuj studentoj prezentas la sufiĉe multnombraj eksterlandanoj, preferantaj la studadon en Aŭstrio ol tiun en siaj hejmlando, ĉu pro politikaj motivoj (la granda amaso da studentoj el ĉiuj Balkanaj ŝtatoj), ĉu pro scienca prefero de la malnova kaj fama Viena universitato. Oni povas renkonti ĉi tie homojn el ĉiuj terpartoj, eĉ kelkaj amerikanoj estas renkonteblaj. Sed malgraŭ la internacieco de tiu publiko la internacia ideo ne faras grandajn konkerojn. La kaŭzo por tiu fakto devas esti vidata parte en la socia strukturo de la studentaro (vidu en n-o 208), parte en ilia deziro kiel eble plej rapide fini la multekostan studadon. Pro tio la plimulto el la studentaro evitas zorge ĉion, kio forprenas iom da ilia valora studtempo — la kunvenoj de la esperantistoj ekzemple estas nur malmulte vizitataj. 9282.

Ĉiu Sekciano devas esti ne nur kunlaboranto de SAT-eldonoj, sed ankaŭ ĝia abonanto kaj disvastiganto!

Pri Internacia Scienca Inform-Servo

Esperanto je la servo de scienco kaj tekniko

La Internacia Scienca Asocio Esp-ista projektas organizon de internacia scienca informservo (ISIS). **Celo:** Liveradi al sciencaj laborantoj de ĉiuj landoj - f r e ŝ a j n precizajn k r e k t a j n informojn-resumojn k kronikojn pri scienc-teknikaj novaĵoj. **Organizo:** a) Korespondantoj, b) centra oficejo, c) landaj oficejoj. **Korespondantoj,** por la div. fakoj, ekz. fiziko, medicino, geografio ktp. troviĝantaj en ĉiuj landoj, regule unue ĉiujn du monatojn sendos al la centra oficejo esp.-lingvan kronikon pri sia fako, resumon de novaj ĵurnaloj, raportojn ktp. **Centra oficejo** redaktas la ricevitan materialon, multobligas ĝin en esp. lingvo k dissendas ĝin al la landaj oficejoj (kaj esp. interesuloj). **Landaj oficejoj,** tuj post ricevo tradukas la informfoliojn en la koncernan nacian lingvon, multobligas ĝin maŝine k dissendas ĝin al sciencaj revuoj, gazetoj k tagaj ĵurnaloj. **Centra oficejo** krom tio havos informfakon, per kies perado oni povos ricevi artik. originalajn, ligojn k materialojn el la landoj, kie troviĝos landaj oficejoj. **Financa flanko.** La multobligo k la dissendo de la informa materialo de la centra oficejo kostos ne pli ol 20 germ. markojn, samajn elspezojn havos la landaj oficejoj. La centron transprenas ISAE, la landajn filiojn devos pagi la koncernaj akademiaj esp.-gruparoj.

Necesas sukcesigi esp-on en la scienco! Ni bezonas kunlaborantojn en ĉiuj landoj, el ĉiuj fakoj! Ĉiuj kunbatalontoj tuj sendu sciigon al la prepara provizora komisiono: **Berlin, Germ., Esperantista Rondo Akademia, Universitato,** kun indiko de kompleta adreso, nomo, profesio, fako. Pluajn detalojn sciigas la komisiono, aŭ ISAE. Krom tio vidi artikolon de H. Muravkin en la Bulteno de ISAE n-o 9, n-o 10, n-o 11 1928. Ĉiuj akademianoj k kapablaj esp-istoj kunhelpu!

La fakkunsido dum la 8-a SAT-Kongreso decidis publikigi la supran alvokon en "S-ulo" k la Scienc-Kultura-Sekcio de SAT alvokas ĉiujn kapablajn SAT-anojn subteni la efektivigon de ISIS per aktiva partopreno. 2921.

Ĉiuj studentoj kaj scienc-laborantoj devas kunlabori en SK-Sekcio!

NIA POŜTO

10 336. — Ni dankas pro via artik. Ni estas ĉiam pretaj akcepti viajn trad. Eble vi povas havigi al ni gaz. aŭ ĵurn. kun artik. pri stud. vivo.

Lublinano. — Al lasta let. resp. ni sendis. Jurnalo dume ne aperis pro someraj ferioj — sekve artik. ne povis aperi. Skribu!

488. — "Let. el Lond." k "Novaĵoj" ni ricevis. Petitan mater. ni havigos al vi. Necesas ja ĝin serĉi.

ABONU AL "LA NOVA EPOKO"!

TRA ESPERANTIO

INTER NI

Kiam mi asertas, ke en nia eduk-kulturcela organizo devas regi tolerema kaj eĉ dubema spirito, ne sekvas el tio, ke devas esti same en partio aŭ sindikato, kiuj estas batalorganizoj. Kiam oni partoprenas batalon, tiam diskutado kaj toleremo estas malutilaj.

Kompari ne estas pruvi. Sed komparo helpas kelkfoje klarigi, komprenigi demandon. Mi do faru komparon.

Estas milito. Ĉe la stabo teknikistoj, fakuloj studas por starigi la plej taŭgan planon, la plej bonan taktikon, unuvorte por decidi pri la plej trafaj rimedoj por akiri la venkon. Ĉu la decido farota estos la plej bona principe? Neniu povas tion aserti. Bonaj argumentoj ekzistas por pravigi kontraŭajn tezojn. Povas eĉ okazi, ke la alprenota plano estos la pli malbona. Tamen ĉiuj fakuloj konsentas, ke kiam temos apliki la planon, ĉia diskuto pri ĝi estus malutila.

Per severa aplikado de malbona plano oni eĉ povas iafoje akiri venkon, kaj per malsevera aplikado de bona plano malvenko povas rezulti.

En la kadro de SAT, la anoj de diversaj laboristaj organizoj, inter si konkurantaj, devas troviĝi en la spiritostato de stabanoj, kiuj esploras pri la plej bonaj rimedoj por akiri la venkon. Agante en sia partio aŭ sindikato, ili devas esti en la spiritostato de militantoj, kiuj celas nur apliki difinitan planon, difinitan taktikon por venki la malamikon.

En nia esperanta asocio ni ĉiuj lernu, esploru, komparu la tezojn, la taktikojn, la metodojn. Kaj kiu alvenis al la konkludo, ke la anarkista metodo estas la plej trafa, tiu provu apliki ĝin en sia anarkista rondo; kiu akiris la konvinkon, ke la komunista taktiko estas la plej ĝusta, tiu obeu la disciplinon de sia partio. Same agu la socialisto aŭ sindikatisto.

SAT estu edukejo, ne agitejo.

Politika agitado estas ia batalo kaj sekve la gvidprincipoj de SAT tie ne taŭgas; sed ankaŭ ne taŭgas la agita spiritostato en nia esperanta organizo tutmonda.

Kiu ne kapablas fari tian diferencon inter la du movadoj, tiu ne estas konscia SAT-ano kaj ne kapablas labori trafe por nia afero. E. L.

Je la nomo kaj adreso de la administranto ni instalis poŝtĉekajn kontojn en:

Stockholm, konto n-o 4268, kaj
Wien, konto n-o D.- 137725

AL ĈIUJ LIBERPENSULOJ

La fakkunveno de la liberpensuloj dum la SAT-kongreso en Göteborg (vidu sube la "Protokolon") decidis aranĝi en la kadro de SAT liberpensulan sekcion. Oni elektis K-don Hubricht kiel redaktanton por Liberpensula Paĝo en "S-ulo". Nun mi hodiaŭ direktas min al ĉiuj liberpensuloj en SAT kun jenaj klarigoj: Nia Sekcio devas celi unuigi la ateistajn SAT-K-dojn, publikigi en "S-ulo" liberpensulan paĝon, aranĝi dum la SAT-kongresoj fakkunvenojn, helpi al la liberpensuloj ĉe instalo de kontraŭreligiaj muzeoj kaj ekspozicioj, aranĝi liberpensulan gazetservon. Por plenumi niajn taskojn, ni bezonas almenaŭ unu seriozan kunlaboranton el ĉiu lando. Sendu tuj vian adreson al la subskribinto. La taskoj de kunlaboranto estas: Varbi por esp-o inter liberpensulaj organizoj, helpi regule ĉe la Liberpensula Gazetservo, donante de tempo al tempo informojn pri la ateista movado en via regiono, pri kremacio (fajrobruligo de kadavroj) kaj kremaciejoj. Tiucele trastudu la specialajn liberpensajn gazetojn kaj ankaŭ laboristajn taĝjurnalojn kaj kulturrevuojn. Ankaŭ ni devas observadi la kontraŭulojn, tralegi iliajn gazetojn kaj traduki ravajn artikolojn kaj notojn pri jenaj temoj: Ŝtato kaj eklezio, eklezio kaj lernejo, leĝoj pri eksiĝo el eklezio, statistiko pri eklezi-eksiĝoj, ŝtataj subvencioj por eklezioj kaj sektoj. Ankaŭ informu nin pri okazintaj kaj okazontaj kongresoj kaj konferencoj de liberpensuloj, eklezianoj kaj sektanoj. El longaj artikoloj traduku nur la ĉefaĵojn. Raportu koncize! Ĉiam indiku nacilingve la nomon de la gazeto, el kiu vi ĉerpis, kaj la daton. Sendu la notojn laŭeble ĉiusemajne en malferma kuverto kun surskribo "manuskripto"; tiel ĝi kostas nur afrankon de presaĵo. Por ne bezoni aĉeti la diversajn gazetojn, vizitu la legsalonon de iu granda biblioteko en via urbo, kie vi trovos parton de la dezirataj gazetoj. Por helpi al niaj sampensuloj ĉe instalo de kontraŭreligiaj muzeoj, ekspozicioj ktp., kolektu bildojn, afiŝojn, fotojn, gazetojn, flugfoliojn, literaturon liberpensan kaj religian, se eble, eĉ religiajn objektojn. Estas dezirataj precipe bildoj de liberpensulaj orfejoj, kremaciejoj kaj preĝejoj, kiuj nun servas kiel kulturejoj por laboristoj. Plie vi havas la devon traduki la de l' centrejo ricevitajn informojn nacilingven, ilin multobligi kaj forsendi al la ateista kaj laborista gazetaro. Fine kontrolu la sukceson de via laboro, pri kiu ni volas fari statistikon. Kunlaborontoj! Nia Sekcio kreiĝas. Helpu fari el ĝi bone funkciantan aparaton! La ateista mondo tre atente observas nian movadon. Sufiĉas montri al la alvoko kaj raporto de K-do Incertov, aperinta en n-o 210, por ekkoni kiaj sukcesoj estas atingeblaj. Do, K-doj, helpu kaj kunlaboru! Ĉio dependas de via aktiveco.

Kurt Hubricht, Leipzig O 30,
Mariannenstr. 22, I.

Donacoj al SAT kaj ĝiaj organoj

Fera Gvardio. — Jeleznjakov (Samara) 3 rubl. por julio, aŭgusto, septembro. V. Baĵenov (Ĉita), brikoj por 6 monatoj 6 rubl.

Municio. 30 fr. fr. memore je Währing. 8130 — 5 mk. g.; 2419 — 1,26 mk. g.; 2378 — 2,50 mk. g.; 10032 — 10 kr. ĉeĥ.; Hoffmann (Leipzig) 1 mk. g.; 13104 — 3,65 mk. g.; 11678 — 1 dol.; 10085 — 2 ŝil.; 5665 — 1,50 mk. g.; 11988 — 2,80 ŝil. aŭstr.; Gastado en Oslo 10 kr. norv.; 7471 — 10 ŝil.; 2788 — 0,50 mk. g.; 5288 — 5 fr. svis.; 9421 — 1 mk. g.; 4358 — 0,25 rubl.

PROTOKOLO

de la kunsido de liberpensuloj dum la 8-a SAT-Kongreso en Göteborg

La kunsidon partoprenis 36 Gek-doj. Oni elektis kiel prez. K-don Klaps (2421), Danzig, sekr. K-don Klys (4104), Minsk.

Tagordo: 1. Pri liberpensula sekcio de SAT. 2. Pritrakto de temoj en "S-ulo". 3. Esp-o en Internacio de prol. liberpensuloj. 4. Diversaĵoj.

1. K-do Muravkin (Berlin) post mallonga skizo de deveno de religio prop. organizi liberpensulan sekcion de SAT, kies taskoj estus kunligi diversl. liberpens. k esti por ili informejo. Por gvidado oni devas elekti red. de ateista paĝo en "S-ulo", sekretarion k lian helpanton. La SAT-eldonkooperativo devos eldoni klerigan liberpens. literat. Post diskut. oni akceptis jenan prop.: Starigi liberpensulan sekcion de SAT. Redaktoro estu K-do Hubricht (Leipzig). Sekretario — K-do Kurt Klaps. Helpanto — laŭ elekto de Danzigaj liberpensuloj. Landaj reprezentantoj: Svedio — K-do Ekström, Boras, Kullen 10. Anglio — K-do Yelland, dume Laborista Klubo en Londono. Norvegio — K-do Friden, Halden, Skippergt. 10. Blankrusio — Sukevic-Tretjakov, Minsk. Redakcio de "Belaruskaja Vjoska".

La sekret. devas organizi reprez. de aliaj landoj.

2. Oni akceptis prop.: "La kunsido deziresprimas, ke en "S-ulo" ne aperu porreligiaj artikoloj" (kontraŭ unu voĉo). En ateista paĝo de "S-ulo" oni presigu ne nur kronikon, sed ankaŭ artik. pri metodo de ateista agado.

3. K-do Muravkin prop. agi en naciaj liberpens. grupoj por esp-o, ĉar gvidanto liberpens. intern. tre emas esp-on. La liberpensula sekcio devas sin turni senpere al Internacio de prol. liberpensuloj por apliko de esp-o.

Oni akceptis rezolucion: "La kunsido de la liberpensuloj de la 8-a SAT Kongr. dezirprop. al la Kongr. de prol. liberpensuloj eluzi esp-on por la intern. gazetservo."

4. Rap. pri la kunsido oni sendu al "S-ulo" k E. K. de SAT. Dum la 9-a SAT-Kongr. en Leipzig oni ankaŭ kunvoku kunsidon de prol. liberpensuloj. Prezidanto: Kurt Klaps. Sekretario: Klys Jan.

Bona propagando en Sovetio

Antaŭ mi kuŝas ekzemplero de "Kalendaro-Informilo" kaj "taglibro por instruistoj" por la jaro 1928/29, eldonita en tre plaĉa formo kun pli ol 200 paĝoj, de la Ŝtata Eldonejo Gozisdat en Moskvo (ruslingva). Ĝi enhavas taŭgan propagandan artikolon de K-do Lidin pri esp-o kaj instruistaro, ankaŭ mallongan gramatikan skizon kaj rekomendon de literaturo kaj lernolibroj. Similaj propagandaj artikoloj troviĝas en la "Kalendaro por Lernantoj" kaj "Kalendaro por ĉiuj", eldonataj de la sama eldonejo. Ĉe la granda disvastiĝo de tiuj eldonaĵoj tra tuta Sovetio la enpreso de priesperantaj artikoloj estas precipe atentinda kaj efika. K-do Lidin sufiĉe facile atingis la konsenton ĉe la gvidanto de l' kalendarfako ĉe Gozisdat. La rezulto de tiu atingaĵo certe estos bonega. Kontente notante tiun sukceson, ni alvokas samtempe alilandajn SAT-anojn imiti tiun ekzemplon kaj atingi, ke en la nun preparataj Kalendaroj por 1929 (ofte tre disvastigataj inter la laboristaro) aperu artikoloj pri nia movado. N. B.

Aŭskultu, parolas Leningrado!

SEU-Komitato de Leningrado sciigas al ĉiuj radio-amatoroj, ke ĉiu sabate de 23.30 h. oni disaŭdigas radio-programon por estonta semajno, ĉiuvendrede de 23.30 h. informojn pri Sovetio; dum 11-jara jubileo de Oktobra Revolucio oni disaŭdigos specialan radio-spektaklon. Ĉio en esperanta lingvo. Krome oni disaŭdigas leterojn ricevitajn de niaj lab. kor-oj k ĉiujn artikoletojn de Esp. Servo en "lab. radio-ĵurnalo" (ruslingve). Tiu atingaĵo estas grava venko, kiun ni devas fortikigi per helpo de alilandaj K-doj. Tial ni proponas al tutmonda SAT-anaro: Aŭskultu Leningradan radio-stacion (ondlongo 1000 metroj)! Skribu viajn dezirojn, viajn proponojn, skribu leterojn! Neniu forgesu, ke radio estas nia tutmonda plej simpla propagandilo. Sendu laŭ adreso: Sovetio. Leningrado. Centro. 1. Ul Gercena 37. Al Radio-Peredaĉa, aŭ 2. Poŝtkesto 305, al SEU-Komitato.

P. Tilin (9310).

Per legado vi lernas . . . Legu regule . . . Abonu la semajnan legaĵon — "S-ulo"!

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

BULGARIO. Plovdiv. La novefondita lab. grupo vigle laboras. Ĝi havas jam propran murgazeton. — **Sofia.** La lab. grupo faris grandan propagandafiŝon por AIZ k esp-o; la afiŝo estas en klubejo de Lab. Partio. La grupo pretigas sian propran murgaz. en la sama klubejo. Al multaj geesp-istoj, politikaj malliberuloj, la LEG komencis sendi div. esp-aĵojn. — **GERMANIO. Ammendorf.** Dum sept. ni eluzis kelkajn okazojn por propagando: 9. 9. dum 20-jarfesto de la Halle-a naturamika grupo. 16. 9. propagando en Döllnitz inter naturamikoj. 20. 9. publika kunveno, kiun partoprenis K-do Bässler kiel parolanto k K-do Nekrasov (Moskvo). La kom. gazeto Klasbatalo aperigis div. raportojn (vidu sub "Memornoto"). Kurso en Ammendorf (10 p.), en Döllnitz (25 p.), en Mücheln (11 p.). — **SOVETIO. Minsk.** Post somera interrompo rekomenciĝis la organiza laboro. Unua kunveno 1. 10. Estis akceptata plano por 1 monato. Krom tio oni disdonis laboron al aktivuloj. Komence de l' nova lernjaro oni organizas novajn esp. rondetojn en lernejoj k kluboj. (12 893.)

DEKLARO

Kvankam ni opinias tute bagatela tiun aferon, ni publikigas, por kontentigi K-don Batta (246), Vieno, jenan deklaron:

En artikolo pri ALLE-jarkongreso, kiun verkis suprecitita K-do k kiu aperis en n-o 187 de "S-ulo", ni forstrekis, pro manko de loko, ĉ. 20 liniojn. En la prilaborado flanke de l' redaktoro okazis jena erareto: ni enpresis, ke la kongr. okazis en "Vieno" anst. "Wiener Neustadt". Korekto jam estas farita de K-do 6411 (en "S-ulo" 196). Enŝoviĝis ankaŭ alia eraro: (reprezentantaj) "169 membrojn el 33 grupoj" anst. simple "el 33 grupoj". Pri tiu eraro respondecon ni ne akceptas, ĉar ni opinias, ke tiel estis en la de ni ricevita manuskripto. En la kopio, kiun sendis al ni K-do B. kun sia protesto, ni konstatis, ke la korekto estas manskribe farita en cetere maŝinskribita manuskripto, sed la originala skribo fakte estis kiel la teksto publikigita. Ni bedaŭras la aferon, sed oni ne devas fari el muŝo elefanton, k ni opinias, ke neniu leganto de "S-ulo" povis konkludi el la ĝustigo de K-do 6411, ke K-do Batta estas "mensogulo". Almenaŭ ni volonte deklaras, ke ni alte taksas la fervoron de nia K-do k neniam dubis pri lia bonintenco. Red.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Hector Hodler, lia Vivo kaj lia Verko. Universala Esperanto-Asocio 1908—1928. Genève 1928. 12, Bould. du Théâtre. Prezo: sv. frk. 2,50. Form. 12×16½ cm. 168 pĝ. — Okaze de sia 20-jara ekzisto UEA aperigas tiun indan memorigon pri sia fondinto, Hector Hodler. Kiu jam antaŭ kaj dum la milito estis esp-isto kaj partoprenis iom aktive la tiaman movadon, tiu ne povis preterpasi senatente nomon kaj verkon de tiu distinga karaktero, de Hodler. Tralegante ĉi tiun libron, lian biografion verkitan de E. Stettler, elekton el liaj karakterizaj artikoloj aperintaj en "Esperanto", — mi plej vive estis memorigata pri multaj horoj de juneco, kiam mi sopire atendis, en antaŭmilita kaj dummilita tempo, la ĵurnalon, por ekscii, kion nun diros Hodler per sia gvidartikolo. Kaj vere, li havis multon por diri al sia esp-ista legantaro. Precipe en la dummilita epoko li montriĝis en la plenforto de agado. Tiu kriza epoko montris lin kiel neŝanceleblan internaciiston. Li estis idealisto, sed lia idealismo ne estis senbaza: li celis tuj praktike utiligi esp-on. Estis li, kiu donis vivon kaj animon al UEA depost fondiĝo ĝia kaj metis je ĝia servo la gazeton "Esperanto", al kiu li oferis monon kaj energion, redaktante ĝin kun eksterordinara ĵurnalista lerto ĝis sia vivfino (1920). Li metis je la dispono de l' membraro jarlibron kaj delegitan servon. Kion postmilite solvis SAT sur la bazo de l' klasa principo, tion preparis antaŭmilite Hodler en formo de neŭtrala organizo (UEA). Ĝi prosperis sub lia celkonscia gvidado, kaj ni konfesu, ke eĉ dum la milito li sciis resti konsekvenca kaj kunteni sukcese la organizon en plej malfacilaj cirkonstancoj. Al multaj donis konsolon liaj dum milita tempo verkitaj artikoloj, legataj en tieaj kaj transaj tranĉeoj, kaj refirmigis la perdiĝantan konvinkon pri la konstruaj fortoj de l' homaro. Vere mirinda estis lia kapablo de antaŭvido. Ni citu unu alineon, kiun li aperigis en julio 1917 (do ankoraŭ pli ol 3 monatojn antaŭ la Rusa Revolucio): "Sed eĉ se ni allasas la . . . hipotezon, ke unu el la militantoj fine elvenkos la alian, ni, laŭ la jam pli-malpli publike konataj militceloj de la batalantaj nacioj, povas antaŭvidi, ke la teritoriaj ŝanĝoj, kiel ajn gravaj ili estos je politika vidpunkto, ne estos tiaj, ke ili per si mem profunde ŝanĝos la vivkondiĉojn de la eŭropaj popoloj kaj la iradon de la civilizacio. Kontraŭe, multe pli gravaj, pli profundaj, pli esencaj estos la transformoj, kiujn la milito realigos en la strukturo de la socio kaj en la tutmonda ekonomio . . ."

Ĝis nun UEA ne trovis anstataŭanton al Hector Hodler. N. B.

Esperanto. Grammatikk og Ordlister (Gramatiko k Vortaretoj). Norv.-esp-a k esp.-norvega. Enhavo sama kiel ĉe "ŝlosilo" kun vortaret-aldono. 70 pĝ. Prezo: 50 n. oeroj. Havebla ĉe l' supra adreso.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Örebor Kuriren, Örebro, 24. 9., Faŝisma kulturo (201), Uj Elöre, N. Jorko, 25. 9., Ni ripozas (202/03), 23. 9., Jaŝasun.

Represis el "Senn. Revuo":

Uj Elöre, N. Jorko, 28. 9., Pri maljuna Tilabaj (aŭg.).

Priesper. artikol. k notojn enhavis:

Daily Herald, London., 12. 10., D. Deutsche Eisenbahner, Berlin, 7. 10., Uj Elöre, N. Jorko, 9. 9. (ankaŭ pri SAT), La Capital, Rosario, 15. 8., Signalen, Stokh., 11. 10., Klassenkampf (Klasbatalo), Halle, 19. 9., 24. 9., 25. 9., 26. 9., 29. 9., 1. 10. (kurso, vizito de sovetiano en A'dorf ktp.).

Peresper. materialon enpresis:

Travail (laboro), Lyon, 13. 10.

NIA POŜTO

9235. — Jes, ni uzos vian artik., tuj kiam loko permesas.

8906. — Ni uzos nur, se loko permesas.

Pia Floro la plej juna, 30 tagojn aĝa esperantistino

salutas Gek-dojn esperantistojn tutmondajn per

Kurt Klaps (2421) kaj edzino Gertrud (11676), Danzig

Tiflisa Komitato de SEU k grupo de SAT-anoj anoncas sian ofic. adreson, kion oni petas sendi materialojn destinitajn por publikigo k presigo en prol. gaz. k ĵurn. de Transkaŭkazio en Kartvelio (Georgio). — Adr.: Sovetio, **Tiflis,** Engels-str. 36-a, al K-do Johano Ełuŝkovskij.

Komunistoj! SAT-Kamaradoj!

En Aŭstrio la ĉiutaga komunista presorgano "DIE ROTE FAHNE" en la mezo de novembro festos sian **10-jaran ekzist-jubileon.**

Revoluciuloj! Senprokraste el la tuta mondo sendu mallongajn, oficialajn salutleterojn de la frataj organoj kaj organizoj al suba adr.

Redakcio de "DIE ROTE FAHNE" Pramergasse 8, VIENO IX (Aŭstrio)

KOMJUNULOJ!

Komjunula klubo en Sandviken (Svedio) arangôs la 25. 11. 28

Internacian leter-vesperon

Skribu multnombre al:

K-do Heldor Abrahamson, Bjorkgatan 3, Sandviken, Svedio.

Respondo garantiata.

ENHAVO:

	paĝo
Pri proleta literaturo	33—34
Konflikto en Jugoslavio	34—35
Hodiaŭ en Bulgario	35—36
Kultoj al kadavroj	36
Raportoj	36
Letero el Londono	37
Diversaĵoj	37
Eksterordinara tago el mia vivo	37
Sennaciula Scienc-Kultura Paĝo	38
Tra Esperantio	39—40
Anoncoj	40

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)